GISTO, OKT-2006.
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Georgo Otto Vaske
Skribo ttt-kongrua

.....

LA HAVEBLA

Tuj post mia partopreno en la E-evento okazinta en la lernejo I.E.Dom Diogo de Souza, 14/10/06, mi relegis la etan jxurnalon “È o que tem” far gxiaj gelernantoj. Kunordigas gxin Instr. Cezar Dorneles Soares. Ties agrabla legado enhavas notojn pri chiutagaj aktivadoj. Inter la tekstoj tre plachis al mi la intervjuo kun profesorino Liane, chefe sxian sagxan aserton “scio estas chio... se vi ne scias, la unua fripono regos vian volon” Gxi estas klera averto chefe por nesciaj knabinoj avidaj je bonaspekto kaj elokvento, nacilingve, “baba de kiabo”.

E-EVENTO en POA.

Domagxe logxas mi for en arbaro kaj ne povis chiutage veni al POA. Tial mi cheestis nur matene de 14/10-06. Laù mia konstato la evento plachis al chiuj. Superbe elstaris la teoria kaj pratika demonstro pri gestaj lingvoj far nia alte kapabla samideano Zaghetto. Li lerte prezentis gestojn, sintenojn kaj vizagxajn esprimojn kun praktikaj ekzemploj. Li ankaù sukcesis al tuta cheestantaro komprenigi la artifikojn uzatajn de la interpretistoj cele akompani la rapidan vortofluon de parolanto. La gesta lingvo havas alfabeton LIBRAS sed aldone gestistoj posedas konvenciajn gestojn kiuj certagrade kurtigas la vortojn. Post fari la komencan literon ili faras geston kiu kompletigas la signifon de la vorto. Tre lerta elpensitajxo. Tio memorigis al mi pri kurtigo de vortoj far telegrafistoj pere de la internacia Q-kodo. Ekz.: QRV = mi estas preta ricevi vian mesagxon kaj kvitanci gxin aù, la kontraùo, QRL= mi estas okupita. Da tiaj plus multaj mallongigoj, BT=bonan vesperon; 73=brakumon; 86=kisojn, ktp, ebligas rapidigi la QSO=komunikado.

Aliurbana samideano laùdis, ke pokaj krokodiladoj okazis sed, same kiel chiuj, plendis pro la malgranda nombro de partoprenantoj. Okazis prelegeto pri radioamatorismo, tagmangxa kunsido kaj poste perbarka rondvetura promeno sur la estuaro Guaíba. Komplimentojn kaj laùdojn al chiuj plejzorgaj organizintoj!

BEDAÙRO

Pluraj gekompanoj kun bedaùro rimarkis ke nia diligenta Kleonice ankoraù ne sukcesis, helpe de kuracisto, plene resanigi sian edzon. Baldaùan resanigxon!

Dr.SOLON

Nia estiminda rondano, konstanta partoprenanto en la V-Kafrondo verkis nacilingve tekston tre interesan por klinigi homojn ekster la E-movado almenaù analizi la strukturon de nia lingvo. Li mencias la sxajnan facilecon de la angla lingvo kun gxiaj miloj da esceptoj kiel ekz.:”Tree day weekend” kaj pri gxia malfacila prononco kaj komprebeblo “Shet, shit, beach kaj bich” trovebla en la frazo “I go to the beach with a bich” - Legita de veterana pastro, kapelano de miaurba hospitalo, laùdis gxin. Domagxe li ankoraù ne decidis verdigxi.

ESTORIO far Juremir M.Silva (Resume)

Kvar homoj dronis sed atingis insulon. Estis du viroj kaj du virinoj, patro kaj filino plus juna paro, edzo kaj edzino. La patro, 50j, Andre´ kaj filino 19j Ilana. Plus la edzo Karlo, 40j kaj ino Julja 35j, en 12 jaroj da felicha geedzeco. Post kiam pasis la esperotempo pri baldaùa savigxo, ili klopodis transvivi la malfacilajxojn, kun oftaj deprimoj, ploroj, desperoj. Tiel ili pasigis 15 monatojn. Karlo kaj Julja havis sxancojn laùvole seksumi. Andre´ toleris la mankon de ino. Ilana provis intimecon kun Karlo. Chio iradis trankvile kiam André provis intimigxon kun Julja. Karlo kolerigxis. Kvereloj okazis sed Julja pacigis. Private – inter la gelegantoj – Sxi felichis pro la intereso de du viroj. Dum la kulmino de kvereloj ili decidis dividi la insulon en du partojn. Ili vivis preskaù nude. La manko de seksumado frenezigis ilin. Okazis interkonsento, pro la nenormalaj cirkonstancoj. Karlo havos Ilanan kaj flankenlasos Juljan. Ili kunvokis la inojn kaj eksplikis la kialon. Julja rifuzis. Kial sxi lasu sian edzon, por ke sxi seksumu kun alia viro? Sur la insulo ili tre bezonis unuj la aliajn. Komencis por ili Ínfero. Julja mortigis sxian rivalan inon. Karlo planis mortigi Andreon. Cxi tiu, por vengxi sian filinon, mortigis Juljan. Restis por Karlo mortigi Andreon kaj mortigi sin mem. Jen estorio ricevita ene de viskibotelo trovita sur la sablo de plagxo. – Nun, ne mortigu la tradukinton char kontraùe Gisto finigxos!

MIKROFONE

Hieraù, 23.10.06 alvenis la bele ilustrita trimonata jxurnalo MIKROFONE n° 15, eldonata de Cho-Ro-I plus belaj PKartoj. Estas gxi brila ideo, por vere amikigi la tutmondan esperantistaron. Laù mi, mankas pli intensa interkonatigxo, por ke E-eventoj altiru geamikojn resopirajn revidi unuj la ceterajn. Bonvenas fotoj kun nomoj de la CRI-geparolistoj kaj de homoj prezentataj de Mikrofone. BV daùrigi tiel. Mi dankas, pro la mencio de Gisto kaj miajn primekojn. Bonvenus ekscii chu alilandaj aùskultantoj ankaù rimarkas iom da malfacilajxo, far parolistinoj (escepte de Roza), en la prononcado. Kun pardonpeto al ili, oni juste diru ke la viraj parolistoj havas parolorganojn pli adekvatajn al flua E-parolado. Tre plachis al mi la foto de la amparo Danijana kaj Cui, kiuj decidis masoni la fundamenton de vere verda familio. Ke la cxarma ekzemplo estu logajxo por multegaj gefraùloj. Escepte felichan kaj ekzemplodonan kunvivadon tutkore mi deziras al ili. Mi mem estis ne sufiche bonaspekta por konkeri la koron de azianino kiam mi agxis 30 jarojn...hi...hi.

Mi ricevis seson da MIKROFONE do, kiu ne ricevas gxin sed volas, petu al mi.

Vortoj MI-ESTAS-LA

Komencantoj tro ripete uzas ilin. Tio igas la tekstojn lamaj. Konsciigxu pri tio. NE-esperantistoj primokas tion. Pro tio multaj samideanoj kasxas nian lingvon ne uzante ofte senkovertajn posxtkartojn!

RUZA FRAÙLINO

En trajna kupeo vojagxis tri junaj fraùloj kaj cxarma fraùlino, tiel bela ke chiuj butikoj fermus la pordojn, por gapi al sxi. La kvaropo konversaciadis tempopasige. Baldaù temis pri erotiko. La fraùlino, memfida, al ili proponis:

- Se chiu el vi donos al mi 10 realojn, mi montros miajn femurojn. La tri pagis, sxi montris siajn nudajn femurojn. Sxi daùrigis provokon:- Se chiu donos al mi 50 realojn, mi montros mian pugon. Denove la tri viroj pagis kaj sxi montris sian nudan pugon kaj daùrigis la ekscitigan ludon proponante: se chiu pagos al mi 200 realojn, mi montros kie mi suferis cezaran kirurgion. Chiuj pagis kaj sxi montris la urbeton kie la vagonaro jxus pasis.